

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 3/1982 ★ 6:50 kr



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★
Telefon: 08 - 11 74 34 ★

EsperantoCentro är öppet måndag
— torsdag kl. 17 — 19 ★ Postgiro:
20 12-3, Esperantoförbundet ★
Medlemsavgift: direktansluten
medlem 50 kr, ungdomsmedlem
under 26 år 25 kr, familjemedlem
(utan tidning), 15 kr ★
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften ★
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet SEJUs
blad *ktp*.

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet ★ Adress:
EsperantoCentro, Brunnsgatan 21,
11138 Stockholm ★ Ansvarig
utgivare: Bertil Åkerberg ★
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
telefon hem 08-712 82 91 ★
Prenumeration: 50 kr per år,
postgiro 20-12-3,
Esperantoförbundet ★ Tidningen
utkommer med åtta nummer per år
★ Fotosats och tryck:
EsperantoCentro, Stockholm 1982

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö
★ Besöksadress: Möllervångsgatan
20 B ★ Öppettider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17
— 18 ★ Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även under
sommaren ★ Telefon: 040-12 20 29
★ Postgiro: 578-5 ★ Expedition:
Wivi Nilsson ★ Styrelsens
ordförande: Anita Lindblom

I höst ska vi på kurs till Løten i Norge

Nu gäller det att vara snabb i
vändningarna! Den 22, 23 och 24
oktober kommer de svenska och
norska esperantoförbunden att
ha ett gemensamt arrangemang i
Løten, i närheten av Hamar i
Norge. Och man ska anmäla sig
till arrangemanget **senast den 1
oktober**. Så det gäller att inte
lägga tidningen åt sidan alltför
länge!

Mötet i Løten är en fortsätt-
ning, på sätt och vis, av förra årets
liknande norskt-svenska möte i
Årjäng.

Arrangemanget består av olika
kurser, till vilka man ska anmäla
sig. Det finns fyra olika att välja
emellan:

1. Introduktionskurs för ny-
börjare
2. Konversationskurs
3. Litteraturkurs
4. Kurs om internationella
kommunikationsåret.

Särskild den sista kursen är
viktig inför nästa års tema-år.

Programmet börjar fredagen
den 22 oktober på kvällen, i
Hamar, med besök på järn-
vägmuseet. Senare förflytar
man sig per buss till fritidsan-
läggningen Budor, där man får
kvällsmat.

Hela lördagen ägnar man sig åt
kurser, med pauser för kaffe och
lunch. På kvällen blir det under-
hållning och dans.

Även söndagens förmiddag
blir det i viss mån diskussioner.
Klockan 12 åter man lunch efter
vilken man reser hem.


Løten ligger intill Hammar,
som i sin tur ligger ca två timmars
tågresa från Oslo. Ska man åka
tåg dit kan man lämpligen ta
15.42 tåget från Oslo S. Man kan
åka bil också och tar man då sig
till E6 och följer den norrut.

VAD KOSTAR DET?

För 330 norska kronor får du vara
med i Løten. I priset ingår logi i
stugor för fyra, sex måltider,
kaffe flera gånger om dagen,
besök på järnvägmuseet och
bussresa Hammar-Budor och
tillbaka. Du måste ha lakan med
dig. Mot 40 norska kronor kan
även lakansproblemet lösas. Om
du kommer till Hammar med bil,
lämna den kvar i Hammar. Man
kommer att färdas på en priva-
tväg som lär vara avgiftsbelagd.
Det kommer att finnas plats i
bussar för alla som anmält sig.

Man anmäler sig till den
arrangerande klubben i Norge:
La norda Stelo — Esperantoklub-
ben i Hammar, c/o Ingrid Strøm-
næs, Bekkesveien 53, N-2300
Hamar. Avgiften betalar du till
samma adress, postgirokonto 3
67 51 88 (dvs 330 eller 370 norska
kronor) Glöm inte att ange på
talongen vilken kurs du anmäler
dig till, t ex "Kurso 3".

I turistanläggningen finns det
plats för 107 sammanlagt och
man hoppas på att fylla så gott
som alla sovplatser. Men som
sagt: den 1 oktober ska din
anmälan och betalningen vara
hos klubben i Hammar!



INNEHÅLL/ENHAVO

- 34/1 höst ska vi på kurs till Löten i Norge
- 35/Ni turnis nin eksteren dum SEF-kongreso
- 37/Hungara profesoro pri esperanto kaj ni
- 38/TEMO: KANTOJ
- 38/Knabino en ringo
- 38/Printempo en Roslagen
- 39/Ŝtelisto via nomo
- 39/La trubaduro
- 40/Roza en balo
- 40/La universala kongreso ĉijare en Antverpeno
- 42/JES&NE
- 43/Persone: Sendi leterojn per libroj
- 44/Eserpantonytt

Ni turnis nin eksteren dum SEF-kongreso

Meze de majo Nyköping gastis la jarkongreson de Sveda Esperanto-Federacio. La urbo ne havas organizitan klubon, kiu surprenu la laboron de organizado de kongreso, sed ĝi ja havas esperantistojn, kiuj akceptis fari parton de la laboro, kun la ideo, ke kongreso eble helpas al starigo de loka klubo, kiel simile okazis en aliaj lokoj.

Henry Thomander kaj Bertil Nilsson, kiuj respondecis pri la loka aranĝado, preparis sin bone. Laŭ ilia iniciato la kongreso vidiĝu ankaŭ inter la urbanoj de Nyköping, kion ili atingis per diversaj manieroj: antaŭ la kongreso ili distribuis tra la urbo kelkajn milojn da informiloj; la saman informilon la kongresanoj disdonadis dum la sabata antaŭtagmezo al butikumantoj, kun kiuj multaj ankaŭ ekbabilis; en la urba biblioteko estis videbla malgranda ekspozicio, kiun lernejoj el Nyköping aranĝis; dum la kongreso okazis speciala kurso por instruistoj-neesperantistoj.

Ĉi tiuj aranĝoj donis iom alian kadron ol kutime al la kongreso; precipe la "devigo" eliri el la kongresejo por informi al nekongresanoj estas ero nepre ripetenda.

La jarkongreso cetere enhavis la tradiciajn erojn de sveda jarkongreso: jarkunvenojn de SEF kaj de Eldona Societo, prelegojn kun sekvantaj diskutoj, varian vesperan programon,

ekskurson k.s.

Kiel kongresejo funkciis la urba domo de Nyköping kun siaj multaj ejoj. La jarkunvenon de SEF oni lokigis en la ĉambron de la komunuma deputitaro.

LA JARKUNVENO

La jarkunveno de SEF sekvis la ordinaran tagordon, Laŭtradicie Åke Blomberg gvidis ĝin kaj Märtha Andréasson protokolis.

La jarraporto ne kaŭzis specialajn diskutojn kaj estis rapide aprobata, same kiel la ekonomia raporto. Post malŝarĝo de la malnova estraro sekvis la elektoj, en kiuj oni reelektis Roland Lindblom kiel prezidanto de SEF por unu plia jaro, kaj same reelektis en la estraron Märtha Andréasson, Anita Lindblom kaj Birger Viggen. Nova anstataŭanto fariĝis Ingemar Nordin.

Revizoroj por la venonta jaro fariĝis Sven Alexandersson kaj Åke Blomberg, kun Nils-Erik Kristoferson kaj Leif-Gunnar Nordenstam kiel anstataŭantoj.

Pli da diskutoj kaŭzis la pri-traktado de la diversaj proponoj al la jarkongreso, Ni citu rekte el la jarkunvena protokolo pri la diskutoj kaj decidoj faritaj:

La unua propono venis de la klubo en Ljungby. Ili proponis, ke la estraro farigu iaspecan diplomon por personoj, kiuj malavare donacis monon al la esperantomovado.

La estraro komentis, ke estas bezonata preta "papero" por

esprimi sian dankon al apogantoj kaj proponas, ke spertulo ellaboru ion taŭgan.

La jarkunveno principe aprobis la proponon, sed donis al la estraro la taskon trovi personon, kiu scias kaj pretas pretigi la dankesprimilon.

La dua propono estis ensendita de Lennart Åberg. Temas pri individua membriĝo de SEF-anoj al UEA. Li atentigas, ke apartenas al la taskoj de SEF helpi kreskigi la individuan membraron de UEA por doni al la internacia organizo fortan personan kaj ekonomian bazon. Ĉar eblas fari interkonsenton kun UEA pri favoraj kondiĉoj por kolektiva aliĝo, li proponas, ke la jarkunsido komisiu al la estraro de SEF informiĝi ĉe UEA pri la plej favoraj kondiĉoj pri individua membriĝo kadre de la kolektivo de SEF kaj vaste konatigi la ideon al la membroj de SEF, prezentante ĝin dum la kongreso.

La estraro komentis, ke ĝi kompreneble volonte subtenas la ideon, ke ĉiu esperantisto estu individua membro de UEA. Multaj membroj certe povos porti la koston de individua membreco, sed ne ĉiuj. Ĝi ne kontraŭis demandi ĉe UEA pri eventualaj favoraj kotizoj,

Lennart Åberg akcentis, ke ni esperantistoj havas la eblecon esti rektaj membroj de internacia organizo kaj tiu organizo bezonas nian apogon. Se ĉiuj esperantistoj estus rektaj membroj, la kotizoj povus esti multe pli malaltaj.

La jarkunveno decidis laŭ la propono de la estraro, kun speciala aldono, ke la estraro laboru por kreskigi la individuan membraron de UEA.

La tria propono venis de la estraro kaj temis pri altiĝo de la membrototizoj. Oni konstatis, ke la membrototizoj ne kovras la kostojn por la membro, Dum konferenco en Norrköping en aprilo la estraro kune kun klubaj reprezentantoj el kelkaj lokoj diskutis la ekonomion de la asocio, De tiu konferenco venis propono pri jenaj kotizoj:

Ek de 1983 rekta membro pagu 65 kr
 kluba membro pagu 55 kr
 juna rekta membro pagu 35 kr
 juna kluba membro pagu 25 kr
 rekta familia membro pagu 25 kr
 kluba familia membro pagu 20 kr
 La plej granda altiĝo estos por

junaj membroj inter 21 kaj 25 jaroj, ĉar de 21 jaroj oni pagu kiel plenkreskuloj.

Okazis sufiĉe vigla diskuto dum la jarkunveno kaj diversaj proponoj venis. I.a. oni proponis libervolan altigitan kotizon, sed la kasisto, pro administraj kaŭzoj, preferas la monon kiel donacon. Dum la diskuto venis propono pri subvencio de junaj membroj. Tiun demandon oni ankaŭ diskutis dum la ekonomia konferenco. La opinio estis, ke devas esti tasko de la kluboj doni al siaj membroj subvenciojn,

La jarkunveno decidis laŭ la propono de la estraro.

Dum la konferenco en Norrköping oni ankaŭ tuŝis la demandon de duontage salajrata persono, kiu deĵoru en la EsperantoCentro en Stokholmo. Necesas malŝarĝi la personojn, kiuj nun laboras tie aŭ doni al ili eblecon dediĉi sin al laboroj, kiuj estas pli efikaj por la movado.

La estraro petis pri rajto dungi personon, kiu deĵoros en la EsperantoCentro dum du jaroj. Oni petu helpon de kluboj kaj individuoj kaj se venos sufiĉe da pozitivaj respondoj, oni tuj komencu.

Ankaŭ pri tiu demando estis vigla diskuto. Venis i.a. propono, ke oni provu havi senlaborulon ("AMS-dungiton"), kiu povus esti senkosta por ni, sed la prezidanto respondis, ke tiukaze ni ne povas mem elekti personon, kaj ni devas havi esperanto-parolantan deĵoranton.

Estis decidite, ke la estraro havu la rajton mem aranĝi laŭplej bona maniero.

De la klubo de Motala venis kvin diversaj proponoj. Unu temis pri aranĝo de informkunvenoj kaj poste studrondoj en popolaj altlernejoj. La estraro opiniis, ke estas granda laboro, kiu devas esti okupo de la kluboj. Tion opiniis ankaŭ la jarkunve-

RESULTATRAKNING 1981.		1980	
INTÄKTER			
Medlemsavgifter	57 785.--	45 475.--	
Klubo Cent	5 700.--	3 620.--	
Gävor	5 040.--	3 299.50	
Ränta	9 380.43	2 538.40	
EsperantoCentro	9 633.75	32 017.25	
La Espero	3 339.--	9 481.89	
Esperanto-Nytt	2 668.95	6 031.45	
Informationsfond	9 684.11	22 544.56	
Övrigt	9 392.29	14 832.50	
	<u>158 623.53</u>	<u>139 840.55</u>	
KOSTNADER			
La Espero	55 437.27	29 544.69	
Esperanto-Nytt	8 212.79	14 241.85	
Lokalkostnader	27 633.95	28 321.85	
Verksamhetsomkostn.	15 233.53	19 177.71	
Avskrivningar	6 582.--	3 157.--	
Informationsfond	11 958.27	9 444.06	
Resefond	600.--	-	
Överskott			
Infond	-2282.84	13100.50	
Resefond	- 600.--	315.--	
ECentro	-	16656.45	
Övrigt	35848.56	32 965.72	5871.44
	<u>35848.56</u>	<u>32 965.72</u>	<u>5871.44</u>
			<u>35 943.39</u>
			<u>139 840.55</u>
BALANSRAKNING PER DEN 31 DECEMBER 1981.			
TILLGÅNGAR		SKULDER	
Kassa	824.60	Diverse personer	49 037.13
Postgiro	43 041.22	Klubo Cent -82	900.--
Bank	87 308.60	La Espero -82	400.--
Fordringar	500.--	La Espero -81	6 840.--
Inventarier	9 172.10	Esperanto-Nytt -81	1 525.--
Värdepapper	3 580.70	Leverantörer	381.--
Upplupen ränta	7 961.57	Informationsfond	27 681.59
Förutbet. kostn.	16 461.78	Resefond	993.52
-	-	Eget kapital	81 092.31
	<u>168 850.57</u>		<u>168 850.57</u>

no.

Alia propono celis komunumajn bibliotekojn, al kiuj oni instigu havigon de kursoj en esperanto sur kasetoj aŭ diskoj. La estraro subtenis la proponon, kun la aldono ke nun ne ekzistas kursoj kun kasetoj. Kiam estos preta la nova lernolibro "Jen nia mondo" oni povos aktualigi la proponon. La jarkunveno apogis tion.

Tria propono celis interesigi la Svedan Radion pri sendado de kursoj en esperanto kaj anstataŭigon de iu el la 25 lingvoj, en kiuj oni dissendas eksterlanden, per esperanto. La estraro ne volis proponi forigon de iu lingvo, sed volonte denove provos persvadi la radion uzi esperanton.

La kvara propono temis pri poŝtmarkoj. La poŝta administracio eldonas katalogon pri poŝtmarkoj en diversaj lingvoj — kial ne en esperanto? La estraro opiniis la proponon interesa kaj pretis skribi al la poŝto.

Laŭ la kvina propono oni eldonu korespondan kurson pri esperanto, pri kio la estraro samopiniis, informante, ke la

demando estas observata kaj pridiskutata.

Post tiuj diskutoj la jarkunveno ankaŭ akceptis proponon de la estraro, ke Tiberio Morariu elektigu honora membro de SEF, Sekvis kortuŝa danko de la nova honora membro, kiu rakontis pri sia alveno al Svedio,

ALIAJ PROGRAMEROJ

Pri la aliaj programeroj nur mallonge. Dum la vespera programo en la halo de la urbodomo oni povis aŭdi kantadon de Nyköpings Kammarkör, kiu por la okazo prezentis kelkajn novtradukitajn kantojn el la sveda. La tradukojn majstre faris Sven Alexandersson kaj ili estis same majstre prezentitaj,

Gasto de la kongreso kaj ĉefa prelegisto estis la hungara profesoro Istvan Szerdahelyi, pri kiu vi povas legi en alia artikolo.

Vekaj kongresanoj havis la eblecon frumatene ekskursi al la birdoriĉa lago Hallbosjön, kie ili konatiĝis kun la birdoj kaj iliaj esperantaj nomoj, la kvardeko trovis la inviton alloga.

Franko Luin

Hungara profesoro pri esperanto kaj ni

Post la jarkongreso en Nyköping nia gasto d-ro Istvan Szerdahelyi vizitis la urbojn Uppsala kaj Stockholm. Li renkontis klubanojn, sed ankaŭ kolegojn ĉe la universitatoj.

Antaŭ lia foriro ni kaptis la okazon intervjui lin pri lia percepto de la situacio de la sveda esperanto-movado kaj pri la nuna situacio en Hungario.

—Mi spertis ke en Svedio ekzistas tre seriozaj fortoj en la esperanto-movado. Ĝoje mi spertis ke la koncepto de la gvidantaro estas absolute moderna, komprenanta tiujn taskojn, kiuj vere povas antaŭenigi kvalite la movadon. Sed oni devas komenci, aŭ ĉar estas ja komencita, oni devas plifortigi la praktikajn efektivigojn de tiuj celadoj, kiujn postulas la moderna organizaĵo de esperanto. Do,

mi pensas unue kaj ĉefe pri la objektiva altnivela informado de la ne-esperantista vasta publiko. Estas tre grave, ke tiu informado havu konstantan karakteron, ne nur hazardan. Mi komprenas ke vi ne povas fondi apartan informan revuon, sed mi povas proponi, ke ĉiu dua numero de via revuo estu tia: unu numero estu por la esperantistoj, unu por la ekstera publiko. Eĉ estus bona ideo, se ĉiu esperantisto abonus ĝin al ne-esperantista homo, al iu direktoro de lernejo aŭ iu instruisto de fremdaj lingvoj. Abonus por li esperantiso por unu jaro kaj la sekvan jaron li eble mem abonas. Do, tiu estas la unua afero; la dua afero estas nepre tiu, kiun ankaŭ vi ĉiuj sentas. Estas la lerneja politiko, ĉar fakte instruistoj estas tre gravaj. Nun mi ne scias kiom da instruistoj vi

havas. Mi scias ke la ILEI-sekcio ne estas sufiĉe vigla. Mi neprevolus, ke vi atentu pri tio. Kelkfoje partoprenu ankaŭ la ILEI-kongresojn kelkaj reprezentantoj de la svedaj instruistoj, ĉar tie ili povas interŝanĝi spertojn kaj interkonatiĝi kun alinaciaj pedagogoj.

Sajnas al mi, ke ĉe la universitato de Uppsala oni povus enigi minimume iun seminarion pri lingvistiko, en kies kadro oni povus ankaŭ instrui esperanton kiel la unusolan funkciantan interlingvon. En Stockholm mi rimarkis, ke la profesoro, Björn Hammarberg, tre simpatie interesiĝis pri esperanto. Evidentiĝis en pluraj eksterlandaj universitatoj, ke la vojo enigi esperanton en la universitato estas tra la interlingvistiko. Se estas bezonate, mi havas nian programon tradukitan ankaŭ en esperanton, do, mi povas ĝin sendi al ili kaj eĉ mi povas transdoni miajn spertojn, ĉar nia universitato havas certajn rilatojn kun tiuj universitatoj.

D-ro Szerdahelyi rakontis pri hungarlingva revuo »Mondo kaj lingvo«, pere de kiu la hungara esperanto-movado informas la vastan publikon pri lingvaj demandoj kaj problemoj. Li ankaŭ informis pri la lerneja programo en Hungario. En la baza lernejo esperantoinstruado okazas enkadre de la junpionira movado. La lernantoj faras provojn, triŝtupajn, kaj pro sukcesitaj provoj ili ricevas insignon, verdan steleton, kiun ili portas sur la uniformo. Kiu portas tri steletojn plenumis la plej altan ŝtupon. En la meza lernejo esperanto eniras kiel elektebla studobjekto en du formoj, same kiel kvanto da aliaj lingvoj. Sur la plej alta nivelo denove komenciĝos en septembro porinstruistaj kursoj en instruista altlernejo. En la budapeŝta universitato esperanto troviĝas kiel C-fako, kun unujara enkonduka studo kaj trijara faka studo. Oni preparas mezlernejajn instruistojn de esperanto kaj esperantofilologojn. Dum la dek ses jaroj, kiam tiu fako funkciis, ĝi multe transformiĝis por integri en la katedro. Iom post iom ĝi transformiĝis al aplikata lingvistika subfako, kio tamen ne multe ŝanĝis la esencon, ĉar oni daŭre instruas la saman materialon.

Anita Lindblom



Jen denove tradukoj de kelkaj kantoj. La tri unuaj, tradukitaj de Sven Alexandersson (Salex) ricevis sian "bapton" dum la jar-kongreso en Nyköping ĉi printempe. Ĉu la aliaj estas jam "baptitaj" aŭ ne, ne estas konate; vi povas ja "bapti" ilin mem!

Knabino en ringo

Knabino en ringo iras kun ĉeno el or',
katenas amaton de sia kor'.

Ho plej kara knabineto, ne ligu kun fort',
intencas ne mi kuri for.

Malligas la knabineto la ĉenon el or',
rapidis arbaren la knabo for.

Lin ĉasis la junular' per pafiloj dek kvin,
se volas vi ion vi jen trovas min.

Knabino nun jam edzino laŭ sia demand'
al knabo plej bela en tuta la land'.

Feliĉa la knabineto kun la muzikant',
sedancas ŝi, ludas ja ŝia amant'.

Tradukis: Salex

Printempo en Roslagen

Suno dronas en paca lag'
hirundo hejmas post longa tag'
sunsubiro brilas je la zefira pas'
paradas la floroj en amekstaz'.

Johansson, la kukola kri'
Johansson, en kur' rapidu vi
Johansson, vidu bulbojn ĉi
la betuloj verde staras nun.

Johansson, kordojn aŭdu jen
Johansson, nin sekvu en promen'
Johansson, verdas la eben'
jam paduso floras en la sun'.

Kun rapid', kun rapid' arboj vestas sin,
ĉiuj birdoj trilas, ĉiuj lagoj brilas.
Kun rapid', kun rapid' tero festas nin,
kun malfermaj sentoj trinku el trezor'.

Kun rapid', kun rapid' ŝvebas la odor',
la florar' burĝonas kaj esperon donas.
Kun rapid', kun rapid' tero turnas sin,
velkos baldaŭ la printempa flor',

Johansson, la lumturoj jen
Johansson, al danca partopren'
Johansson, vibras arĉa tren'
la printempo baldaŭ estos for,

Roso brilas sur herb-velur',
krepusko fuĝas el la natur'.
Levas sin aŭroro je la zefira vag'
kaj baldaŭ aperos la nova tag',

Johansson, ...

ROSLAGSVÅR
Teksto: Alf Henriksson
Muziko: Hugo Alfvén
Traduko: Salex

Ŝtelisto via nomo

Fi ŝtelisto via nomo,
la amikon ŝtelis vi,
sed mi havas ja konsolon,
ĉar alian trovos mi.
Kredas, tra la la, (3-foje)
kredas mi,

Granda estas la doloro,
la amikon perdis mi,
sed mi havas ja konsolon,
ĉar alian trovos mi.
Kredas ...

Vidu, estas mi edzino,
havas edzon en la dom',
lia nomo estas Petro,
bela estas lia nom'.
Kredas ...

La edziĝo donas zorgojn,
cedas mi al tiu lud',
servos mi al kamparanoj,
pensas ne pri la amuz'.
Kredas ...

TJUV OCH TJUV DET SKA DU HETA
Tradukis: Salex

La trubaduro

Grafino ĉe sia fenestro
sidadis en la buduar'
en ornamita noktvesto
— nun venas kantist' kun gitar'.
— Jes, volas kanzonon mi aŭdi,
senedza mi restas, ho vel!
— Pro l'belo mi volas vin laŭdi,
se vi estos mia trofe'.

Ploradis grafino ĝis fando;
vi sciu, forestas la graf',
militas en la eksterlaŭdo;
de li restos nur epitaf'.
Envenu ĉe mi por kanzono,
ĉar ege malgajas ja mi!
— Por bel' estas laŭdo bezono,
mi kantos volonte pri vi!

Sed kantis li ne sen marĉando:
— Nur pro viaj mano kaj kor'!
Ĉe ŝia talio rubando
ruĝetis; ŝi prenis ĝin for,
ĝin donis al la trubaduro
por ligi ĉe la instrument'.
Ektondras jen paŝ' trans la muro
— enmarŝas la graf' kun akcent'.

Ekbruis li tuj per la glavo
kaj ĉuis freneze kun rid':
— Vi kara de belo kaj ravo,
nu, kion prezentas ĉi vid'?
Diable, ĉu tiu figuro
sin trovas invite ĉe mi?
Li montris al la trubaduro
per glavo en sanga mani'.

Vekiĝis grafin' post la sveno
kaj diris: — Ĉi tiu barbar'
nur petis de mi sen ĉagreno
rubandon por sia gitar'.
— Ĉu tion la vero konvojas?
li diris kun duba mien'.
— Ho, Rikard, ŝi diris, mi ĝojas,
mi ĝojas pro via reven'!

— Ĉu vere? Pardonon milfoje!
Ŝin kisis la grafo kun sent'.
Sed jen trubaduro survoje
pendigi sin sub la tegment'!
Kaj nun per anĝela transporto
en alton al pli bona land'
ŝvebadis li post la morto
kun silka, ruĝeta ruband'.

Teksto: Ruben Nilsson
Muziko: Gunnar Turesson
Tradukis: S.A. Jacobson

Roza en balo

Ĉu mi nun dancas kun Andersson,
eta mi, eta mi kun Fritjof Andersson?
Ĉu min invitas vi al la bal',
ĉies ideal'!

Vivon mirindan vi havas, ĉu ne?,
vivon agrablan, ĉar por korife'
kaj por maristo, muzika artist'
ne povas esti trist',

Triste ne, kredis min Roza,
estas nun danci kun vi.
Kie ajn mi estu, Roza,
ĉiam memoros vin mi.

Muzo vi estas de mont' Helikon',
ĉarma vi estas en via fason:
hara girlando, koloro, profil',
varma okulobril'!

Ĉu mi inspiras al Andersson,
eta mi alinspiras Fritjof Andersson?
Pri eta mi eble estos kant'!
Ho, Dio, kia vant'!

"Roza en bal' ", ĉu ne bela titol'?
Ek en minoro kaj fin' en major'.
Kaj kiam pretos, do, via kompon'
de mia propra kanzon'?

Ĝis la supe' ĉivespere
pretos la kanta esprim'.
Dum ni babilas prozere
pensas mi jam pri la rim'.

Venas el parko tilia odor',
Estas lunlumo sur la tiliflor
Ne vidis iu, ke mi kisis vin:
Roza mi amas vin!

Teksto kaj muziko: Evert Taube
Tradukis: S A Jacobson kaj F Luin



Denove okazis kongreso de
Universala Esperanto-Asocio,
ĉiĵoj en Antverpeno en Belgio.
Ne estis same varme kiel pasin-
tjare en Brazilio, sed la tuta
semajno estis sen pluvo. Proksi-
mume 2000 personoj, ne ĉiuj
oficiale anoncitaj, venis el 51
landoj kaj donis vivon al la
kongreso.

Jam en la vendredo antaŭ la
kongreso la komitato de UEA
kunsidis la tutan tagon, kaj poste
ankaŭ sabate posttagmeze ĝis la
komenciĝo de la "Konatiga
vespero". Sed ĝi ankaŭ kunsidis
plurfoje dum la kongresa semaj-
no. La unuan kunsidon en la
vendredo tamen ĉeestis tro
malmultaj komitatanoj kaj la
kunsido ne povis esti decidopo-
va; pro tio oni devis fari tiujn
decidojn la postan tagon, kiam
sufiĉaj komitatanoj ĉeestis.

La vera laboro okazis en
diversaj komisionoj, kiuj komen-
cis sian laboron jam en la sabata
antaŭtagmezo. La komisionaj
kunsidoj estas publikaj kaj al
kelkaj el ili aliĝis multaj aliaj
kongresanoj, dum aliaj ne allogis
tiom. Unu kunsido de la komi-
siono pri kulturo, ekzemple,
havis nur kvar partoprenantojn,
kiuj sub la gvido de Baldur
Ragnarsson diskutis pri la esper-
antokulturo kaj kiel uzi esperan-
ton por ekkonigi diverslandajn
kulturojn.

Nur 7-8 personoj interesiĝis
pri planado de la esperantolabo-
ro por la venonta kvinjara perio-
do. Pri edukado interesiĝis kel-
kaj pli. Tion oni ankaŭ rimarkis

La universala ĉijare en Antverpeno

dum la "lerneja tago": dum diversaj prelegoj la ejo tiam fariĝis preskaŭ plenŝtopita kaj oni devis eĉ ŝanĝi al pli granda salono.

"La lerneja tago" cetere enhavis multajn tre bonajn erojn: prelegojn, demonstraciojn de lerniloj, provlecionojn k.a.

La komisiono pri eksteraj rilatoj povis raporti pri diversaj gravaj atingoj. Temas i. a. pri kontaktoj en la Eŭropa Komunumaro kaj ĉe Unesko. Oni ankaŭ diskutis la planojn por la jubilea jaro kaj admonis al la landaj asocioj jam nun fari laborplanon kiel festi ĝin.

La diversajn fakkunsidojn oni partoprenis ofte pli diligente ol la kunvenoj de la komisionoj. Dum la MEM-kunsidoj, ekzemple, la ejo estis plenŝtopita. Tio signifas, ke al la homoj la demando pri paco estas tre grava. [MEM signifas "Mondpaca Esperantista Movado"]

kunsido estis debato pri la kongresa temo "Generaciaj aspektoj de la esperanto-movado". Dum la kongresa semajno tiu temo estis diskutata en tri diversaj kunvenoj: la unua pri junaĝo, la dua pri mezaĝo kaj la tria pri maljunaĝo. En la debato dum la dua ĝenerala kunsido estis preskaŭ ĉiam tro longaj paroloj, veraj prelegoj, kaj tio faris la debaton enuiga kaj laciga.

La publika kunsido pri virinaj aferoj estis parte sukcesa, parte ne. Belka Beleva bone prelegis pri la parolarto, sed la posta provo elekti podian grupon, kiu respondus demandoj pri sia ĉiutaga vivo, per kio oni konatiĝu pri la virina situacio diverslande, preskaŭ fiaskis, precipe ĉar la virinoj ne volis sekvi la donitajn regulojn. Sed estis multe pli vigla kunveno ol aliaj, en kiuj plejparte nur viroj parolis aŭ paroladis. Ŝajne virinoj multe pli facile protestas kontraŭ reguloj donitaj



elefantojn, delfenojn k.a., ĉar tute apud la kongresejo estis granda belega zoologia ĝardeno.


Kaj ne eblas fini la raporton sen menci la invititan ĉefprelegiston, sinjoron Mustapha Masmoudi, eksambasadoro de Tunizio ĉe Unesko. Li parolis france, sed oni distribuis lian paroladon antaŭe en esperanto por ke oni povu sekvi lin. En brila maniero li montris al la nunaj malfacilaĵoj en la mondo, kiujn kaŭzas lingvaj problemoj en informado kaj komunikado. Lia tuta prelego meritas citon kaj mi esperas, ke eblos trovi lokon en *La Espero* por ĝi.

Ankaŭ la prelego de Humphrey Tonkin pri la kongresa temo "Generaciaj aspektoj de la esperanto-movado" indas mencion. Li i.a. diris, ke la pensiiga aĝo en multaj landoj malkreskas, kio kreas aron da homoj ankoraŭ sufiĉe viglaj psike kaj fizike, liberaj de siaj ordinaraj okupoj. Samtempe estas tre grandaj problemoj inter gejunuloj i.a. pro senlaboreco. Kian rolon la esperantomovado havu por riĉigi la vivon al tiuj grupoj? Ni povas uzi ĉiujn fortojn, junajn kaj maljunajn.

Interne de la movado oni povas multon fari, ĉar ni devas esti pretaj, kiam la mondo bezonos nian lingvon.

Jen kelkaj fragmentoj de kongreso, kiu eble ne estis tre elstara, sed tamen en multaj pecoj donis al la ĉeestantoj inspiron kaj esperon por nia komuna estonta laboro.

Mårtha Andréasson



Ankaŭ dum la kunsido pri parlamenta agado multaj sekvis la diverslandajn raportojn kaj eble kaptis ideojn por estonta laboro.

La du ĝeneralaj kunsidoj de UEA ne donis sensaciaĵojn. En la unua kunsido estis kelkaj rimarkoj, i.a. pro la neregula aperigo de la gazeto "Esperanto"; proponoj pri pli bonaj kongresoj kaj pli efika laboro. En la dua

de aliaj virinoj ol kontraŭ reguloj donitaj de viroj.

NE NUR KUNSIDOJ

La kongreso tamen ne nur konsistis el kunvenoj kaj prelegoj. Estis ankaŭ balo, ekskursoj, teatraĵoj, aŭkcio kun spertta gvido de Tonkin, nacia kaj varia vesperoj ktp. Kaj kiam oni laciĝis je homa babilado oni povis iri eksteren — kaj rigardi simiojn,

Intensivkurs i oktober

Södra distriktet av SEF anordnar en intensivkurs i esperanto den 9 och 10 oktober 1982 i Vittsjö. Både steg ett och steg två kommer att äga rum (steg två för dem som var med i Ullstorp). Det kostar 150 kronor att vara med och man får kost, logi och kursmaterial för summan. Inkvartering sker i dubbelrum, men det går bra att få enkelrum mot 25 kronor extra. För ungdomar födda 1964 eller senare är kursavgiften 100 kronor. Avgiften betalas till postgiro 13 28 25-1, Södra distriktet av Svenska Esperantoförbundet. Man kan anmäla sig till Karin Strandberg, Husmansvägen 19, 222 38 Lund, eller per telefon 046-114897 eller 0415-50152 efter kl. 16.00.

Men gör det redan denna vecka! Ring, förresten, och fråga om det fortfarande finns plats, innan du skickar in några pengar!

Vem är vem i styrelsen?

Styrelsen för Esperantoförbundet har vid sitt sammanträde i slutet av augusti konstituerat sig så här:

ordförande: Roland Lindblom
v.ordförande: Märtha Andréasson

sekreterare: Anita Lindblom
v.sekreterare: Ingemar Nordin
kassör: Karin Strandberg
övriga ledamöter, inkl. suppleanter:

Niklas Gustavsson
Kerstin Rohdin
Åke Rohdin
Birger Viggen,

Adresser till styrelsen kommer så fort samtliga blir tillgängliga. Roland Lindbloms adress i Ösmo gäller nämligen inte längre, medan Anita Lindbloms nya adress är Oxelvägen 53, 138 00 Älta, tel, 08-773 40 24.

JESÖNE

Nova estro por la instruistoj

Ankaŭ la sveda sekcio de ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, jarkunvenis en Nyköping, Dum tiu kunveno oni elektis novan sekciestron post Olle Olsson, kiu retiriĝis. Lia nomo estas Bertil Andreasson kaj li loĝas en Hörby. Cetere oni reelektis Ingemar Nordin kiel vicprezidanto, Karl-Erik Eriksson kiel kasisto kaj Ingrid Ottosson kiel vicsekretario.

En la jarraporto por 1981 oni rimarkas inter alie, ke la estraro skribis al SÖ pri esperantokursoj por instruistoj, Tri membroj partoprenis la ILEI-konferencon en Gödöllö, Hungario, Du svedaj knaboj ricevis pere de la ILEI-kasisto stipendiojn por partopreni konferencon en Nederlando, kie ili persone renkontis siajn korespondantojn.

La membrototizo de ILEI estas 50 kronoj po jaro (30 por familia membro). Kiel membro oni

trifoje en la jaro ricevas la gazeton *Internacia Pedagogia Revuo*. Oni ankaŭ ofte ricevas rabaton je kotizoj por internaciaj konferencoj, kiujn ILEI organizas. Plej simple oni fariĝas membro per pago al la sveda poŝtgira konto 3 14 30-2, Svenska Lärares Esperantoförbund.

Första pris till svensk

Vid internationella esperantokongressen i Antwerpen utdelades sedvanligt priser för olika bidrag inlämnade till en särskild jury. I gruppen "fotografi" gick första pris till Bertil Danielsson från Årjäng för hans bidrag *Hästen*, avbildad här intill. Tyvärr kommer inte de fina nyanserna med i trycket i *La Espero*.

Bertil Danielsson fick dessutom särskilt omnämnande för sin bild *Generationer*.



Veckoslut i Lysekil

Veckoslutskursen i Lysekil i början av juni blev lyckad. Deltagarantalet var inte stort, men de som kom kunde njuta av vackert väder och en hetta som nästan tog död på studielusten.

En tråkig sak skedde, Förgäves väntade man på en av kursledarna, John Berggreen från Oslo. Man försökte ringa hem till honom, men fick inget svar.

Sedan fick man veta att han hastigt insjuknat och dog några dagar senare.

Deltagarna studerade i tre grupper, av vilka en var för barn. Man tog tillvara alla möjligheter för att lära sig något nytt. Under en utflykt till Stångehuvud, Lysekils yttersta punkt mot havet, hade Henry Laneby förberett en poängpromenad, med frågor om havet. Nu kan deltagarna namn på växter, fåglar och varelser som på något sätt har samband med havet.

PERSONE

Sendi leterojn per libroj

24 jarojn mi havis kaj sukcese debutis kiel poeto. Recenzistoj de multaj gazetoj laŭdis mian verkon kaj ĵurnalistoj min intervjuis kaj fotis. Ĉio ĉi por mi estis tre ekscita. Nun mi ekmigris memelektitan vojon, komenciĝis granda aventuro.

La reagoj de la recenzistoj ne sufiĉis al mi. Mi deziris ankaŭ senpere kontakti legantojn de mia libro.

Mi faris eksperimenton. Mi skribis leterojn al miaj nekonataj legantoj. La enhavon de la leteroj mi hodiaŭ forgesis, sed verŝajne mi interalie klarigis, ke mi ĝojas pro ilia aĉeto de mia poemaro kaj ke mi volonte ricevus iliajn opiniojn pri la libro.

Mi vizitis la plej grandan librovendejon de mia hejmurbo. Mia plano estis enmeti la leterojn en "poŝojn" de ekzempleroj de mia libro. Poste legontoj tranĉile disigu la paĝojn de la libro kaj la leteroj elfalu!

Ankaŭ al amiko en alia urbo mi sendis tian leteron, instrukciante lin, kiel li metu la leteron en libron.

Mi intencis enŝovi la leterojn kaŝe, sed librovendisto observis mian kontrabandon, tamen ne

haltigis min, nur ridante min kuraĝigis ...

Baldaŭ venis leterrespondoj! La respondantoj estis du junaj homoj. Kaj unu neĵuna. Ŝi skribis:

"Vi ne sciis, al kiu vi skribas, kiam vi metis leteron en unu el viaj libroj en la librovendejo. La ricevinto nomiĝas Aksel kaj li ĝojas pri la letero kaj diras, ke li volas skribi al li. Sed li legas multe kaj skribi leterojn ne bone konvenas al li. Cetere Aksel trostreĉiĝis kaj havas kordolon, ne rajtas labori ..."

Mi telefonis al la letterskribintino kaj ankaŭ iris viziti Aksel kaj ŝin.

La paro estis sesdek jaraĝa, ŝi pentristino, li laboristo kaj sindikatisto, fervora libroamanto.

Kiam mi gastis ilin, Aksel ankaŭ komencis rakonti pri io por mi tute nova. Lu lingvo esperanto.

Mi tuj ekinteresiĝis pri la ideo kaj decidis estonte lerni tiun lingvon.

Poste mi transliĝis al la ĉefurbo, kie mi edziĝis al virino, verkisto kiel mi. Ŝi estis pli aĝa ol mi kaj jam publikigis multajn librojn.

Post kelkaj jaroj mi surprize trovis, ke preskaŭ najbare al mia propra adreso estis la ejo de la esperantoklubo!

Mi partoprenis kurson tie. La novan lingvon mi lernis nur malrapide, tamen mi de tempo al tempo daŭrigis la lingvostuda-

don por mi mem.

Kiam mi publikigis alian poemvolumon, mi decidis ripeti mian "botelpoŝtan" eksperimenton. Sed nun racie kaj grandskale.

La antaŭan fojon mi skribis nur kelkajn leterojn. Ĉifoje mi verku multegajn; kaj mi variu la formuladon en ĉiu letero.

Mi venis al eldonista librostokejo, kie kuŝis granda nombro da miaj libroj, altaj aroj, ankoraŭ nedistribuitaj al librovendejoj ĉie en la lando.

Mi prenis la leterojn kaj enmetis ilin en librojn, tie kaj alie.

Ne estis same kiel kiam mi kontrabandis en librovendejo: nun mi ne agis kaŝe, inter ĉirkaŭantaj libroaĉetantoj. Mi estis tutsola inter amaso da miaj libroj kaj mi eĉ ricevis permeson esti ĉi tie.

Bedaŭrinde tiu libro ne estis same sukcesa kiel mia debutaĵo. Nur malmultaj homoj aĉetis ĝin. Vane mi atendis iun ajn respondon je la multaj letervokoj!

Jaroj pasis. Iom post iom mi komencis majstri esperanton. Ĉiam pli ĝi okupis min, fariĝis al mi ĉiam pli kara.

Post dekjara kunvivado kun mi mia edzino mortis kaj mi fariĝis vidvo kun adoleskanta filino.

Poste mi renkontis novan virinon, Birgitta, kaj ni gefianĉiĝis.

Ankaŭ Birgitta verkas, sed pro diversaj kialoj ŝi ankoraŭ ne karietis beletre. Mi mem havas multjaran stipendion, dum Birgitta devas disiĝi inter laciga laborado por havigi monon kaj nur iometa verkado libertempa.

Lun tagon Birgitta montris al mi, ke ŝi aĉetis malnovan libron verkitan de mi. En ĝi surprizo! Letero de mi!

Ĝi atingis adresaton post multaj jaroj, kiam mi jam fariĝis kvardekjara!

Sed Birgitta ne ekĝojis! Ŝi koleriĝis!

En la letero mi nome menciis interalie la ekonomian situacion de du profesiaj verkistoj, mia edzino kaj mi.

Por Birgitta ĉi tio estis moko. Ŝi tuttempe laboradas kaj sopiras, ke ŝi estu libera por povi verki. En la letero ŝi legis pri du privilegita aŭtoroj plendantaj pri sia malfacila ekonomia situacio.

Ceterajn reakciojn je la libroleteroj mi ne ricevis.

Ankoraŭ ne ...

Lagförslag i Brasilien

Som en följd av förra årets internationella esperantokongress i Brasilia har landets riksdag på olika sätt uppmärksammat esperanto: genom att ge ut en skrift om Zamenhof, esperantos upphovsman; genom att inrätta en esperantosektion i riksdagsbiblioteket; genom att ta upp till behandling ett lagförslag ställt av riksdagens andre vicetalman Freitas Nobre.

Lagförslaget syftar till att ändra ett av paragraferna i lagen om högre utbildning genom att ange esperanto som alternativ till andra språk.

Om esperanto i Sovjetunionen

Hos förlaget Nauka har M.I. Isajev gett ut en vetenskaplig analys av språket esperanto, under titeln *Jazyk esperanto*. Boken har kommit ut i serien "Asiatiska och afrikanska folks språk" (!).

Esperanto i Afrika


Esperanto har en mycket svag ställning i Afrika. Det finns esperantister i de flesta länderna, men bara några få har organiserad verksamhet. För att förbättra situationen och få lite fart på verksamheten har en särskild grupp inom UEA börjat arbeta med Afrika som arbetsfält.

Vid kongressen i Stockholm 1980 beslöt man att koncentrera sin verksamhet till Kenya. Under 1981 annonserade man i tidningen *Taifa* på swahili. Till alla som reagerade på annonserna skickade man en broschyr på swahili, en liten lärobok och personliga brev. I år utkom första numret av *Kenya bulletinen*, till vilken de första fyra breven i en korrespondenskurs på swahili bifogades. Man håller på att utarbeta en ordbok esperanto-swahili och swahili-esperanto. Inom

detta projekt samarbetar esperantister från Kenya, Holland, Italien och Storbritannien.

Under 1981 kom en annan bulletin ut, *Esperanto i Afrika*, på esperanto, franska och engelska. Den skickades till alla tillgängliga adresser och man fick bra respons på den. Till "fransktalande" Afrika skickas regelbundet det belgiska nyhetsbulletinen *L'espéranto en marche*, som innehåller också nyheter om esperanto i Afrika.

I andra länder stöder man den verksamhet som finns, framför allt med att skicka läroböcker och informationsmaterial gratis. Organiserad verksamhet finns på Madagaskar och i mindre skala i andra länder. I Angola, till exempel, har en av Svenska Esperantoförbundets medlemmar, Eugenio Mustea, under fyra år tjänstgjort i ett SIDA-projekt och använt tiden till att hålla kurser i esperanto.



Kinesisk tidning om esperanto

Kinesiska esperantoförbundet har börjat ge ut en ny tidning med namnet *La mondo* (Världen). Tidningen är nästan helt på kinesiska och har på ett halvår fått 6000 prenumeranter. *La mondo* vänder sig till inhemska läsare.

Från Kina kommer också tidsskriften *El popola Ĉinio*, helt på esperanto, som riktar sig till läsare utomlands,

Frimärke från Belgien

Lagom till den internationella esperantokongressen i Antwerpen i år gav den belgiska posten ut ett minnesfrimärke med Babels torn som symbol. Under senare år var det bara Sverige som inte uppmärksammat en internationell esperantokongress med särskilt frimärke.

